

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo)



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur)

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm. (Provabono por duonjaro, komen-
cianta en Januaro kaj Julio, 1.200 Sm.). Ĉiu eldono aparte:
1.200 Sm. (0.600 Sm.). Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M (Probeabonnement für ein Halb-
jahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M). Jede Ausgabe ein-
zeln: 2.40 M (1.20 M). Anzeigen: Siehe Tarif auf dem Umschlag

Redaktoro: Friedrich Ellersiek, Berlin S 59, Wissmannstr. 46

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo

11^a Jaro No. 3 A

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40

Marto 1914

Grava avizo!

Germana Esperanto-Asocio kaj Germana
Esperantisto aranĝos

karavanon al la Deko en speciala
vagonaro Berlin—Paris kaj reen

(verŝajne tra Frankfurt a. M.—Metz)
por eksterordinare malalta prezo.

La vagonaro jam estas certigita!

Enkalkulitaj en la prezo estos ankaŭ:

Loĝado kaj po 3 manĝoj ĉiutage (inkluzive trin-
kaĵojn) en bonaj hoteloj en la proksimeco de la kon-
gresejo, trinkmonoj, gvidadoj tra la urbo en veturiloj,
ktp. ktp., entute ĉio, kion oni ĝenerale bezonos krom
la pure kongresaj aferoj.

Detaloj pri tiu ĉi vojaĝo sekvas en la venonta
numero A. Informojn donas la oficejo de Ger-
mana Esperanto-Asocio, Pirnaische Str. 50, II,
Dresden-A., aŭ la redaktoro de G. E., Friedrich
Ellersiek, Wissmannstr. 46, Berlin S 59.

Leteroj al nova esperantisto

2. Kiel mone subteni la Esperanto-movadon?

Kara nevo mia,

Pri tiu ĉi demando, kiun vi faras al mi en via
lasta letero, oni povas skribi librojn de granda amplekso.
Preskaŭ ĝi ne estas respondebla en la kadro de
simpla letero. Tamen mi volas doni al vi almenaŭ
kelkajn konsilojn, laŭ kiuj vi povas agi.

Unu el la ĉefaj devoj laŭ tiu rilato vi jam plenumis:
vi aliĝis al agema grupo esperantista, kiu per sia aneco
al nia granda nacia asocio subtenas ĉi ties multvaloran
propagandan laboron. En la nuna stato de l'enpenetrigo

de nia afero en la grandan publikon estas nepre ne-
cese, ke la fortoj kuniĝu tiel, ke ni kiel eble plej
baldaŭ venku la indiferentecon kaj kontraŭecon, kiujn
multaj homoj ankoraŭ montras al la ideo pri universala
helpingvo. Nur per unueco ni povas atingi ĉi tiun
celon. Tion neniam forgesu, kaj tial pagu volonte
kaj akurate vian kotizon por la grupo kaj zorgu pri
tio, ke ankaŭ aliaj anoj same agu.

Ankaŭ alian gravan devon de subteno vi jam
plenumis per la abono al la oficiala organo de nia
nacia asocio. La financa fortigo de nia gazetaro estas
necesa kaj grava. La gazetaro estas la potenco, kiu
unuavice kolektas kaj kune tenas nian anaron ĉirkaŭ
la standardo de Esperanto kaj duavice portas la ideon
pri nia afero en la publikon.

Sed ne fuŝkomprenu ĉi tiun konsilon. Mi ne re-
komendas al vi la abonon al kiel eble plej multaj
Esperantaj gazetoj. Se vi tion farus, vi agus mal-
prudente kaj malŝpareme, ĉar inter niaj gazetoj ek-
zistas multaj, kiuj ne mēritas tian subtenon. Prezipe
estu singardema kontraŭ novaperintaj gazetoj. Ekzistas
esperantistoj, kiuj sentas en si la kapablon kaj ambicion,
redakti aŭ eldoni propran gazeton, por komuniki al la
mondo esperantista siajn saĝaĵojn. Iu motivo por la
aperigo de la nova produkto estas facile trovita. La
eldonanto aŭ redaktoro prezentas tiun ĉi motivon al
nia anaro kaj nun esperas, ke la abonantoj alflugos
kvazaŭ abeloj al dolĉa floro. Sed baldaŭ tiaj entre-
prenantoj devas ekkoni, ke la tero, sur kiu kreskas
ilia floro, ne donas al ĉi tiu sufiĉe da nutraĵo. La
suko de la floro iom post iom plimalmultiĝas, la bela
kreskaĵo velkas kaj pereas. Kaj la kaŭzo de tio? La
ambiciaj entreprenantoj pensas nur al si mem; ili ne
konsideras la demandon, ĉu ilia kreaĵo estas necesa,
ili ne antaŭkalkulas, mallonge: ili ne posedas sufiĉajn
spertojn. Vidante sian malsuksecon ili kulpigas ĉiun
aliam, la presiston de la gazeto, la nevenintajn abo-
nantojn ktp., nur ne — sin mem.

Tro multe da gazetoj efektive nur malhelpas la
progreson de nia afero, anstataŭ utili al ĝi. Laŭ mia
ĝisnuna sperto tute sufiĉus, se ĉiu nacio por la pro-
pagando de Esperanto havus nur unu bonan gazeton,
kio devas esti la sola oficiala organo de la koncerna

tutnacia asocio. Honora devo de la asocioj estas, aboni kaj atente legi la gazeton. Ankaŭ la fakaj unuigoj esperantistaj havu nur po unu oficialan organon. Kaj se krom tio ankoraŭ ekzistus kelkaj pure Esperantaj gazetoj por literaturo, ni povus esti kontentaj. Nia movado profitus el tia ideala stato kaj ne laste ankaŭ la eldonistoj, kiuj nun vere nenion gajnas per la eldonado de gazeto.

Krom la subteno al la nacia movado vi ankaŭ ne forgesu tiun al la internacia, kiu reprezentigas en la Universala Esperanto-Asocio. Aliĝu ankaŭ al ĝi, ĉar ĝi estas la institucio, kiu jam nun alportas al vi praktikan utilon el la uzado de Esperanto. Kvankam mi ne en ĉiuj punktoj konsentas pri la agado de U. E. A. (vidu mian raporton pri la Naŭa), mi tamen rekomendas ĝin ĉie pro ĝia komuna utileco, kiu espereble ne estos neniigata per neprudentaj decidoj.

Sed nepre ne subtenu entreprenojn, kiuj sin prezentas en iu pridubinda formo sub la preteksto, ke ili volas utili kaj progresigi la Esperantan movadon. Interalie mi celas la parkurban aferon en München kaj ties loterion. Bedaŭrinde la tiel bele elpensita plano de Esperanto-urbo nun malsukcesis, ĉar oni, eble en bona kredo, trofaksis la esperantistaron. Mi antaŭvidis ĉi tiun fiaskon pro diversaj kaŭzoj, kiujn mi hodiaŭ ne volas detaligi.

Mi ĝojas, ke ankaŭ vi vizitos la kongreson en Leipzig, vian unuan Esperanto-kongreson. Pri kongresaj aferoj mi skribos alian fojon. Hodiaŭ mi nur volas rekomendi al vi, donaci pli-malpli grandan sumon, tute laŭ via povo, por la Esperanto-pavilono en la „Bugra“, kie okazos nia kongreso. Certe vi jam legis pri la afero en nia gazeto. Jen bona okazo, por kiu ĉiu esperantisto devus ion oferi, ĉar la pavilono estos la plej bona kaj plej efika propagandilo, kiun ni ĝis nun havis. Antaŭ nelonge mi vizitis Leipzigon kaj tie rigardis la jam starigitan krudan konstruaĵon de la pavilono. Ĝi fariĝas belega (cetere jam ekzistas poŝtkartoj kaj sigelmajkoj de ĝi), kaj ĝi staras sur unu el la plej bonaj lokoj, kie ĉiu vizitonto de la ekspozicio nepre devas ĝin rimarki. Estas nur bedaŭrinde, ke ankoraŭ multaj, eĉ tre konataj, germanaj esperantistoj mankas en la listo de la mondonintoj. Ĉu ili dubas pri la efektiva starigo de la pavilono? Povas esti. Sed ilia dubo estas senmotiva. Espereble ili lastmomente ankoraŭ malfermos sian monujon kaj tiel helpos, ke la pavilono entute fariĝos tia, kia ĝi devas esti pro la graveco de nia afero.

Por hodiaŭ mi nun volas fini, kore salutante vin kaj viajn gepatrojn.

Via fidela
Onklo Tobias

Achtung! Siegelmarken!

Da die technische Ausführung der Siegelmarke für den 9. Deutschen Esperanto-Kongress nicht befriedigend ausgefallen ist, werden wir in kürzester Zeit eine andere Folge herausgeben. Für Interessenten sind die alten Marken, soweit der Vorrat reicht, auch fernerhin zu haben.

Der Leipziger Ortsausschuß

Nia gazetara mizero

[1074]

Kiu nur iomete observis la Esperantan gazetaron, tiu konvinkigis, ke ĝi grave malsanas. Suferantoj estas ĉiuj tri faktoroj de nia gazetaro: eldonantoj, redaktoroj kaj publiko, sed la plej granda malhelpo rezultas el tia stato por nia tuta movado. Por klarigi la aferon, ni volas laŭvice unue priparoli la mizeron de ĉi tiuj kvar malfeliĉuloj, kaj poste ni serĉu kontraŭefikajn rimedojn.

Ĉu ekzistas eldonanto de iu Esperanta gazeto, kiu havas profiton el sia eldonaĵo? Certe ni povas respondi: ne. Sed ekzistas multaj, kiuj havis kaj havas malprofiton, ĉar pro malgranda nombro da abonantoj kaj anoncoj la elspezoj superas la enspezojn. Oni povus supozi, ke la eldonantoj aŭ atendas estontan profiton, aŭ simple estas tiel fervoraj esperantistoj, ke ili volas alporti oferojn por nia movado. Rilate al la unua supozo ili povas esti certaj, ke, se la afero iros ĝisnun vojon, la feliĉa tempo ne komenciĝos en la dudeka jarcento. Rilate al ilia oferemo oni devas respondi, ke ĉiu oferemo estas nur tiam fruktdona, kiam ĝi estas bazita sur logika konkludo kaj nun, kiel ni montros, lamas ankoraŭ ĉi tiu logika konkludo. Jen la kaŭzo de la mizero de la eldonantoj.

La redaktora mizero estas ne malpli granda. La Esperantaj redaktoroj estas bonaj, amindaj homoj, sed ili, laborante, ne povas vivi de siaj moralaj ecoj; pro tio oni ne povas de ili ankaŭ postuli, ke ili fordonu sian tutan forton kaj tempon ekskluzive al sia redaktora tasko, kaj ĉi tiu cirkonstanco des pli malutilas al la gazeto, ju malpli bonajn kunlaborantojn la redakcio havas. La fakto, ke Esperantaj redaktoroj estas superŝutataj per malvaloraj, diletante verkitaj manuskriptoj, ne faciligas ilian pozicion. Ofte esperantistoj estas tro kuraĝaj homoj. Ne unufoje tiu, kiu ĝis la momento, kiam li fariĝis esperantisto, ne kuraĝis skribi plej malgrandan gazetan artikolon en sia gepatra lingvo, sentas sin tuj kapabla, verki longajn „literaturaĵojn“ en Esperanto post kelksemajna aŭ kelkmonata studado de iu Esperanta lernolibro, ĉar artefarita lingvo permesas produkti — malutilaĵojn. Ne mem legi bonajn Esperantajn verkistojn, sed feliĉigi aliajn per sia Esperanta kapableco, estas unua zorgo de esperantistigitaj fervoruloj. De tie devenas en Esperantaj gazetoj la multego da artikoloj, senvaloraj rilate al enhavo kaj stilo.

Sinsekve de tie devenas ankaŭ la tria mizero, la mizero de la Esperanta publiko.

Pro kio oni lernas Esperanton? Ĉu ĝi devas esti spirita sporto aŭ ludilo, forpelanta enuon de ne sufiĉe okupitaj homoj? Kiu lernis Esperanton, volas havigi al si praktikan utilon aŭ almenaŭ konvinki la neesperantan publikon pri utileco kaj graveco de internacia helplingvo; tion oni eĉ ne povas atingi per tondra klakado kaj bruado dum la kongreso.

Esperantisto abonanta iun Esperantan gazeton havas tri celojn: li volas informi sin pri la Esperanta movado, kion efektivas nun sufiĉe la propagandaj gazetoj; li volas perfektigi en bona Esperanta stilo; li volas havi utilon aŭ ĝuon por sia spirito, legante interese verkitajn ĉiuspecajn artikolojn aŭ valorajn, ne konatajn de li literaturaĵojn. En la du lastaj rilatoj la plej granda parto de Esperantaj gazetoj ne povas nun kontentigi eĉ plej modestajn dezirojn de la abonantaro. Malbonan Esperantan stilon, naciismojn, sam-

vole kreitajn vortojn, eĉ gramatikajn erarojn oni tro ofte renkontas en multaj gazetoj. Aliparte la enhavo estas ofte banala aŭ ne interesa.

La aŭtoro de ĉi tiuj linioj foje ricevis de tre klera persono, lerninta Esperanton karakterizan respondon je sia demando, kial li ne abonas iun Esperantan gazeton: „Mi tion provis, ĉar mi esperis trovi en Esperantaj gazetoj interesajn priskribojn el fremdaj landoj, pri fremda nacia vivo, pri loĝantoj, pri kulturaj aferoj, pri ilia lando, pri iliaj spiritaj progresoj, pri iliaj novaj literaturaĵoj; anstataŭ tio mi trovadis plej ofte mallertajn tradukaĵojn el malnovaj verkoj de mia gepatra lingvo, kiujn mi de longe konas aŭ povas legi kun pli granda plezuro en mia nacia lingvo. Pro tio mi ĉesis aboni Esperantajn gazetojn kaj ree penadas informi min pri tiaj eksterlandaj aferoj el ĵurnaloj redaktataj en mia gepatra lingvo. Mi volis senpere per Esperanto interrilati kun la pensmaniero kaj spirito de alilandanoj, sed Esperanto ĝis nun ne kapablas tion efektiviĝi.“

Aŭdinte tian respondon la subskribinto tuj faris al sia konatulo la riproĉon: „Esperantistoj ne devas komence tro multe postuli; abonu kaj apogu Esperantajn gazetojn kaj vi baldaŭ trovos en ili, kion vi serĉas. La mirakla tempo jam preterpasis, sen mono la plej bona redakcio estas senforta.“ Tamen li devis konfesi, ke lia konatulo grandparte estis prava. Kaj tio estas la mizero de l'abonanta publiko.

Konstatinte la faktojn ni priparolu la kaŭzojn kaj serĉu rimedojn.

Ĉar iu certa statistiko pri la nombro da esperantistoj en la mondo ne ekzistas, ni povas nur konkludi laŭ ĝeneralaj sciigoj tiamaniere: Ekzistas en la mondo ĉirkaŭ 1500 organizitaj grupoj esperantistaj; supozante (maksimume), ke ĉiu grupo konsistus el 25 membroj, estus entute 37 500 organizitaj esperantistoj. Se ni nun supozas, ke ekzistus ĉi tiu sama nombro de neorganizitaj esperantistoj, konsistus la tuta esperantistaro el 75 000. Se de la organizitaj esperantistoj $\frac{2}{3}$ abonas iun Esperantan gazeton kaj de la neorganizitaj $\frac{1}{3}$, ni havas maksimume 37 500 abonantojn. Aperas nun pli ol 100 Esperantaj gazetoj. Tiamaniere ĉiu gazeto havas meznombre 375 abonantojn. Tiu ĉi cifero estas verŝajne iom pli malgranda. Ĉiu objektiva observanto tuj konstato, ke ĉi tiu cirkonstanco estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la gazetara mizero; ke ĝi estas la kaŭzo de malprofito de eldonistoj, kaŭzo de preskaŭ senfrukta laborado de redakcioj, kaŭzo de ne tro granda spirita valoro de multaj gazetoj.

Sed sekvas ankoraŭ al tio aliaj tre gravaj malutiloj por nia movado. Unue, multaj, kiuj lernis Esperanton, perdas la intereson pri ĝi, ĉar ili ne trovas en Esperanto la atenditan spiritan nutraĵon kaj, kiel nia konatulo, iom post iom forlasas nian aferon. Due nia propagando ĉiurilate suferas. La plej konvinka ilo por propagando estas la pruvo, ke Esperanto jam alportas praktikan utilon, kaj tio rilatas speciale al Esperantaj gazetoj, kiuj pli multe ol libroj povus ekinteresi la neesperantistan publikon. Se naciaj redakcioj trovas en Esperantaj gazetoj valorajn artikolojn, korespondojn, sciigojn el ĉiuj landoj, ili baldaŭ pli multe ŝatus la Esperantan gazetaron kaj ĉerpis el ĝi temojn por siaj naciaj gazetoj, farante per tio grandan propagandon.

Kaj nun ni serĉu rimedojn por forigi la mizeron.

Anstataŭ pli ol 100 gazetoj sufiĉus por la nuna esperantistaro ĉirkaŭ 30 ĝis 40 gazetoj de du specoj:

1) Ĝeneralaj ĵurnaloj (sumtempe propagandaj) po unu por ĉiu nacio.

2) Fakaj ĵurnaloj po unu por ĉiu ĉefa fako.

Rilate al ĝeneralaj kaj propagandaj gazetoj estas tre oportuna la formo, kiun elektis *Germana Esperantisto*.

Laŭ la nombro da esperantistoj en ĉiu lando devus komence aperi ĝenerala gazeto po unu kajero ĉiumonate. Se la cirkonstancoj tion permesas, devus aperi du kajeroj ĉiumonate; unua por propagando, dua por literaturaĵoj. Poste, kiam la situacio estus pliboniĝinta, la gazeto povus aperi tri, kaj iom post iom kvar fojojn ĉiumonate; ĝi fariĝus jam semajna ĵurnalo.

Fakaj ĵurnaloj elektis, kiel ŝajnas, ĝustan vojon. Ili devas esti tute internaciaj kaj aperi laŭoportune tie, kie ili trovas plej bonajn kondiĉojn. Por publikigi originalajn sciencajn laborojn, ankoraŭ ne venis tempo, ĉar ni havas malmulte da esperantistaj fakaj scienculoj. Por ekinteresi neesperantistajn fakscienculojn kaj instigi ilin, lerni Esperanton, oni devas montri jam nun atingotan utilon por ili, tio estas la ebleco, rapide kaj facile informiĝi pri la internacia scienca progreso.

Tiacele fakĵurnaloj devus koncentrigi mallongajn, sciencajn raportojn pri plej gravaj kaj novaj spertoj, eltrovaĵoj, laboroj, ĉerpitaj de esperantistoj el ĉiuj naci-lingve redaktitaj sciencaj kaj fakaj ĵurnaloj.

Ni ne povas fini niajn rimarkojn rilate Esperantan gazetaron, ne atentiginte tute senpartie la interesulojn pri prudenta agado de la gazeto *Esperanto* por ekinteresi pli grandan publikon. Anstataŭ tradukadi malnovajn literaturaĵojn (unufoje ĝi pekis ĉi-tiurilate) ĝi penas varbi bonajn korespondantojn en ĉiuj landoj, kiuj ofte liveras tre instruajn kaj interesajn artikolojn pri ĉiuj temoj rilatantaj al la kulturŝtato kaj nacia vivo de iliaj landoj.

Esperanto ja devas esti spirita ligilo de ĉiuj popoloj, tial estas tiom pli konforme al la celo, ke popoloj senpere, per Esperanto, donu reciproke al si pli verajn kaj kredindajn sciigojn pri sia ekzistado, ol tion ĝis nun faras naciaj korespondantoj de naciaj gazetoj, kiuj tre ofte ne kapablas, kiel fremduloj, juste prijuĝi la landon kaj ĝian loĝantaron.

Eble unu aŭ alia redaktoro demandos, kiel trovi la necesajn, spertajn korespondantojn?

Turnu vin al *Esperantista Literatura Asocio*, kiu dum la mallonga tempo de sia ekzistado jam sukcesis varbi, kiel membrojn, klerajn kaj bonajn esperantistojn jam preskaŭ en ĉiuj landoj de la terglobo.

E. L. A. verŝajne ne rifuzos viajn petojn peri inter vi kaj siaj membroj.

Nun kelkaj petoj al niaj Esperantaj eldonantoj kaj redaktoroj:

1) Ne perdu kaj ne disigu senutile por Esperanto viajn materiajn kaj spiritajn fortojn per eldonado de multaj, malgrandaj gazetetoj.

2) Priparolu la aferon kaj decidu ĝin kun viaj naciaj kolegoj esperantistaj.

3) Klopodu prosperigi per kunigitaj fortoj en ĉiu lando unu bonan, gravan, Esperantan gazeton.

4) Kie estas necese informadi ligajn distriktajn membrojn pri lokaj aferoj, aldonu al ĉefa Esperanta gazeto hektografitan aŭ, se estos pli oportune, presitan folion kun informoj.

5) Klopodu varbi por via ĉefa gazeto pli multe da eksterlandaj kunlaborantoj kaj korespondantoj, por ke vi kaj viaj abonantoj alkultimigu al internacia Esperanta stilo (se necese korektita de vi), kaj por ke vi havigu al via ĵurnalo interesajn artikolojn originalajn el fremdaj landoj. Pri la propra nacia vivo ĉiu preferas legi siajn naciajn gazetojn.

Sinjoroj, ekster viaj personaj ambicioj vi povas sanigi nian gazetaron, kaj ni ne dubas, ke vi, kiel ideaj kulturpioniroj, tion faros por nia granda, komuna afero.

Mi petas ĉiujn gazetojn pridiskuti la aferon, por trovi oportunan eliron el tiu labirinto. *R. Maske*

Noto de la redakcio — Sendante sian artikolon la verkinto petis nin, ke ni diru nian opinion pri liaj pritraktoj. Tio estas facile farebla per tri vortoj: Ni nepre konsentas! Krom la kalkulo pri la esperantistaro tutmonda, kiu ŝajnas al ni tro malfavora rilate al la efektive ekzistanta nombro da esperantistoj, ni substrekas ĉiun vorton diritan de S-ro Maske. Jam de longe ni intencis publikigi similan artikolon; sed ni ĝis nun ne kuraĝis fari tion, ĉar ni estas unu el la suferantaj partoj de la gazetara mizero, kaj pro tio ni timis, ke oni juĝos partia tian pritrakton de ni mem. Tiom pli volonte ni aperigas la supran artikolon, pri kies senpartieco povas ekzisti neniŭ dubo. Ni ĝojus, se la pritraktoj de S-ro Maske trovus atenton ĉe ĉiuj niaj kolegoj kaj kaŭzus viglan diskuton pri la grava afero kaj — sekve de tio — forigon de la vere ekzistanta mizero. Cetere oni povas vidi el la klarigoj pri nia nunjara programo, kiujn ni donis en la unuaj numeroj A kaj B de la nuna ĵarkolekto de G. E., ke ni, rilate al la taskoj kaj celoj de Esperanta gazeto, plene akordiĝas kun la ideoj de S-ro Maske.

Rimarkinde estas, ke ankaŭ *Onklo Tobias* en sia letero en tiu ĉi numero eldiras similan opinion pri la gazeta afero.

9. Deutscher Esperanto-Kongreß Leipzig, Pfingsten 1914 (30. Mai bis 3. Juni)

Rundschreiben Nr. 5

1. **Ehrenpräsidium** — Wir begrüßen es mit großer Freude, daß die Vertreter der höchsten königlichen, städtischen und militärischen Behörden in Leipzig das Ehrenpräsidium des Kongresses übernommen haben. Es sind dies: Herr Kreishauptmann *v. Burgsdorff*, Kammerherr Sr. Maj. des Königs; Herr Oberbürgermeister *Dr. Dittrich*; der Herr Kommandierende General *Exzellenz v. Laffert*.

2. **Wohnung** — Bezüglich der Unterbringung unserer Gäste sind Verhandlungen mit dem hiesigen Verkehrsvereine im Gange, der durch seine vieljährige Praxis gelegentlich der Messen diese Angelegenheit gewiß zu allseitiger Zufriedenheit erledigen wird. Die angemeldeten Kongreßteilnehmer werden darüber noch durch den Verkehrsverein und den Ortsausschuß nähere Nachricht empfangen.

3. **Sondersitzungen** — Bisher sind folgende angemeldet: U. E. A.-Distrikts-Sitzung; Sächsischer Landesverband; Sächs.-Thür. Verband; Lehrer; Postbeamte; Akademiker; Studenten. Weitere Anmeldungen werden umgehend erbeten, da die Lokalfrage möglichst bald geregelt werden muß.

4. **Post** — Die Kongreßteilnehmer werden gebeten, sich Postsachen mit der Unter-Adresse: *Esperanto-Kongreß, Leipzig, Johannisplatz 3*, nachsenden zu lassen. Das Officejo wird für sofortige Aushändigung Sorge tragen.

5. Programm (unverbindlich)

Sonnabend, den 30. Mai: Vorm. 10 Uhr: Prüfungen der G. E. A.; 1. Beirats-Sitzung der G. E. A.; Prüfungen des Sächs. Esperanto-Instituts. — Abends 1/2 8 Uhr: Begrüßungsabend im Hotel „Sachsenhof“, Johannisplatz.

Sonntag, den 31. Mai: Vorm. 11 Uhr: Eröffnungssitzung mit Festvortrag im Buchgewerbe-Haus, Dolzstraße 1; Festessen in der „Bugra“. — Abends 6 bis 8 Uhr: Distrikts-Versammlung der U. E. A. in der „Bugra“, sodann von 8 Uhr ab Vereinigung im Garten des Haupt-Restaurants (Darbietungen der Ausstellung).

Montag, den 1. Juni: Vorm. 9 Uhr: 2. Beirats-Sitzung der G. E. A. — Vorm. 1/2 11 bis 1 Uhr: 1. Arbeits-Sitzung der G. E. A. in der „Bugra“. — Nachm. 3 bis 5 Uhr: Hauptversammlungen des Sächs. Landesverbandes Esperanto und des Sächs.-Thür. Landesverbandes in der „Bugra“. — Nachm. 5 bis 7 Uhr: 2. Arbeits-Sitzung der G. E. A. in der „Bugra“. — Abends 8 Uhr: „Bunter Abend“ in der „Bugra“.

Dienstag, den 2. Juni: Vorm. 9 Uhr: 3. Beirats-Sitzung der G. E. A. — Vorm. 1/2 11 Uhr: 3. Arbeits-Sitzung der G. E. A. — Abends 8 Uhr: Öffentlicher Propaganda-Vortrag in der „Gutenberg-Halle“, Buchgewerbe-Haus, Dolzstraße 1.

Mittwoch, den 3. Juni: Nachm.: Ausflug nach Zwenkau.

(Die Zeiten für die Sonder-Sitzungen werden demnächst bekannt gegeben.)

6. **Angemeldete Kongreßteilnehmer (bis 19. II.):** P. Ebeling, Kgl. Oberbaurat Schneider, Dr. G. Schönwald, Dr. W. Döhler, H. Hauschild, H. Große, H. Emmerich, H. Rössel und Frau, Fr. J. Offenhauer, Frau Offenhauer, Frau K. Petzold, sämtlich aus Leipzig; Fr. A. Henning, Bromberg; M. Gonnermann, Rudolstadt; Prof. Dr. A. Schmidt, Potsdam; Fr. J. Bücken, Schmargendorf-Berlin; Fr. E. Zibell, Schmargendorf-Berlin; Fr. G. Pielke, Charlottenburg; Fr. C. Schütz, Berlin-Wilmersdorf; W. Schlag, Kötzschenbroda; Prof. Dr. Göhl, Riesa; R. Hengstenberg, Eßlingen; K. v. Frenckell, Dresden; Prof. Dr. Bujwid, Krakau; W. Stoffregen, Bitterfeld; Fr. Ader und Frau, Dresden; W. Ader, Dresden; F. Ellersiek und Frau, Berlin; Novakowsky, Großkayna-Merseburg; G. Mansfeld, Merseburg; O. Preuße, Berlin; L. Gebhardt, Berlin; K. Gebhardt, Berlin; Prof. Nestler und Frau, Auerbach; R. Ebert, Dresden; H. Gätjens, Hohenmoor-Mulsum; R. Krause, Schulitz-Bromberg; Fr. H. Deneke, Magdeburg; J. Michaelis, Magdeburg; Frau Dr. Helmbold, Magdeburg; B. Wottrich, Magdeburg; Frau R. Wotttrich, Magdeburg; A. Schiebel, Bitterfeld; H. Artmann, Bad Harzburg; P. Tarnow, Kiel; Fr. A. Reichert, Kiel; O. Geier, Neugersdorf; H. Gerisch, Auerbach; Frau E. Gerisch, Auerbach; H. Bennemann, Pirna; E. Dörfel, Schönau-Chemnitz; Fr. K. Schindler, Dresden. — Zusammen bisher: 100.

Der Ortsausschuß

Adresse: Esperanto-Kongreß, Leipzig, Johanniplatz 3

Deka Universala Kongreso de Esperanto

Paris, 2a ĝis 10a de Aŭgusto 1914

Aliĝoj kaj pago de kotizo — La nombro de la kongresanoj ĝis la 25a de Februaro estis 1332. La liston de la kongresanoj oni komencos publikigi en la marta numero de la Kongresa Gazeto. Ordigitaj laŭ landoj estas kongresanoj el: Francujo 569; Granda Britujo 248; Germanujo 149; Aŭstrio 69; Hispanujo 62; Belgujo, Ruslando po 52; Svislando 22; Hungarujo-Kroatujo 19; Italujo 17; Danujo 13; Usono 11; Holando 10; Francaj Posedaĵoj kaj Norvegujo po 9; Rumanujo, Svedujo, Kanado, Argentino kaj Aŭstralio po 2; Anglaj Posedaĵoj, Portugalujo, Serbujo, Turkujo, Brazilio, Kubo, Peruvio, Kaplando, Uruguajo, Porto-Riko kaj Filipinaj Insuloj po 1. Ĉar post la 1a de Junio la kongresa kotizo plialtiĝos (25 Fr. anstataŭ 15 Fr. kaj 20 Fr. anstataŭ 10 Fr. por familianoj), estas rekomendinde, kiel eble plej baldaŭ aliĝi. Aliĝintoj, kiuj tamen estos malhelpataj iri al la kongreso, ricevos la pagitan sumon, se ili sciigas tion al la Komitato ĝis la 1a de Aŭgusto. La Komitato retenos nur 1 Fr. por elspezoj kaj por la *Kongresa Gazeto*, kiun ĉiu aliĝinto ricevas, kaj kiu sola jam pli valoras ol 1 Fr. La kotizon oni sendu al *Société Générale (Agence AR)* Boulevard Montmartre, Paris, aŭ oni pagu per ĉeko aŭ transpagilo de *Ĉekbanko Esperantista*.

Alvojaĝo — Por kongresanoj loĝantaj en landoj oriente de Francujo, *Germana Esperanto-Asocio* kaj *Germana Esperantisto* aranĝos karavanon en *speciala vagonaro* al kaj reen. La vagonaro jam nun estas certigita; ĝi veturos de Berlino rekte ĝis Paris, verŝajne tra Frankfurt a. M. kaj Metz, kaj la saman vojon reen. Detaloj sekvas en la venontaj kajeroj de G. E.

Korespondado — *Telegramoj* atingas la organizantojn sub la telegrafa adreso „*Esperanto Paris*“.

Pro kaj por la *leteroj*, kiuj pritraktas diversajn punktojn, oni uzas la jenan metodon: Por ŝpari poŝtelspezojn, la Komitato ĉiumarde kunvenas, kaj en ĉi tiuj kunvenoj ĉiu fakestro ricevas la leterojn lin koncernantajn. Per tio klariĝas, kial letero ne tuj estas respondata. Se ĝi, ekzemple, alvenas merkrede, ĝi devas atendi ses tagojn. Kompreneble urĝajn leterojn oni tuj respondas.

Por eviti malfruon, la demandantoj estas petataj, aŭ en unu letero trakti nur unu aferon, aŭ skribi ĉiun aferon sur apartan folion.

Fine la Komitato petas la korespondantojn, sufiĉe afranki siajn leterojn laŭ *internacia tarifo*.

Vendejo kaj ekspozicio — Por pliriĉigi la propagandan materialon en la ekspozicio dum la Deka, kaj por montri al neesperantistoj la mirindan disvastigon de nia helplingvo sur la tuta terĝlobo, la ĉiulandaj esperantistoj estas petataj, sendi *unu poŝtkarton* Esperante skribitan al la

Deka Universala Kongreso de Esperanto
3, place Jussieu 3,
Paris

Esperantistaj grupoj kaj unuopaj samideanoj, kiuj posedas montrindajn dokumentojn interesajn por la

propagando dum la kongreso (ekz. afiŝoj, artaĵoj, portretoj, kongresmemoraĵoj, albumoj aŭ kolektoj de poŝtkartoj, dokumentoj pri blinduloj, Ruĝa Kruco, muziko, religioj ktp.) kaj volas disponigi tiajn objektojn al la Komisiono de la Propaganda Ekspozicio, estas petataj, direkti tiurilatan proponon al S-ro *C. Rousseau*, 4, place de la République, *Levallois-Perret* (Seine). La Komisiono zorgos pri tio, ke la aĵoj estos plej bone lokataj en la konvena fako de la ekspozicio.

En la ekspozicio oni aranĝos ankaŭ specialan fakon por komercistoj uzantaj Esperanton en siaj katalogoj kaj sur siaj komercaĵoj. La akcepto de la komercaĵoj kaj katalogoj estas *senpaga en tiu ĉi propaganda fako*. (Vidu la alvokon sub „*Ekspozicioj kaj propagandaj aranĝoj*“ en la venonta numero.)

Apud la propaganda ekspozicio estos bela vendejo, kie ĉiu firmo povas vendi Esperantajn komercaĵojn. En tiu ĉi komercejo la akcepto de komercaĵoj *ne estas senpaga*. La regularon oni petu de S-ro Rousseau (adreso supre).

Gejunuloj, kiuj deziras eventuale ricevi pagatan oficon en la vendejo, dum la kongresa semajno, bonvolu skribi al la prezidanto de la komisiono, S-ro Rousseau (adreso supre), leteron en *Esperanto* pri siaj aĝo, kutima profesio, adreso kaj pri la dezirita salajro. La nomaro estos komunikata per dungado al la firmoj, kiuj luos vendotablojn en la vendejo. *Parolflueco de Esperanto kaj bonaj rekomendoj estas postulataj*.

Afiŝo, poŝtkarto, glumarko — La poŝtkartoj kaj glumarkoj reproduktas la afiŝon, kiun verkis S-ro *Agache*. Ĝi montras, en sunsubira lumo, orientan, ekdormantan parton de Paris. Oni vidas maldekstre parton de la Eiffel-turo, en la mezo la riveron Seine, dekstre la arbojn de la bordo kaj la du turojn de *Trocadéro*. La tuto faras artan impreson. Presitaj estas 5000 afiŝoj, 50000 poŝtkartoj kaj 100000 glumarkoj.

La afiŝoj kostas po 1,50 Fr. (inkluzive sendkostoj).

Por kolektantoj oni vendas du apartajn seriojn. Ĉiu el tiuj ekzempleroj estas numerita kaj surhavas la subskribon de la verkinto, S-ro *Agache*. La prezoj estas por

Serio A (numerita de 1 ĝis 100) . . . po 5 Fr.
Serio B („ „ 101 „ 105) . . . „ 10 Fr.

La Serio B ne entenas verdan koloron. Ebla por esperantistoj tio estas nebonaĵo, sed la tre multaj afiŝoj de tiu ĉi serio faras tre pitoreskan efikon.

La poŝtkartoj kostas po 0,10 Fr. (12 kostas 1 Fr., 100 kostas 7,50 Fr.). Tiuj ĉi prezoj ne entenas la sendkostojn.

La prezo de la glumarkoj estas 1 Fr. por 100 ekzempleroj.

Libristoj kaj revendistoj ricevas specialajn rabatojn.

Subtenoj kaj Garantia Kapitalo — La Urba Konsilantaro de Paris donacis 1000 Fr. kaj la Distrikta Konsilantaro de Seine 500 Fr. Per tiuj ĉi donacoj la monsubtenoj por la kongreso atingis la sumon de 3750 Fr.

La sumo de la Garantia Kapitalo estis ĝis la 25a de Januaro: 57200 Fr.

Laŭ *Kongresa Gazeto* kaj aliaj sciigoj

Kroniko el germanlingvaj landoj

Ĉiu grupo kaj izolita samideano estas petataj, raporti al ni kiel eble plej akurate kaj koncize pri sia agado kaj pri la progresoj de Esperanto en sia urbo aŭ regiono. Oni bonvolu sendi la raportojn, skribitajn sur poŝtkarto sen iu alia scigo, nepre ĝis la 20a de ĉiu monato al nia redaktoro, Friedrich Eilersiek, Wißmannstraße 46, Berlin S. 59.

Mallongigoj: E: Esperanto; E-a: Esperanta; E-e: Esperante; P: prezidant(in)o; Vp: vicprezidant(in)o; S: sekretari(in)o; K: kasist(in)o; B: bibliotekist(in)o; R: revizor(in)o; Ks: kunsidant(in)o; s.: supre; ms.: malsupre; v.: vidu; mat.: matene; antm.: antaŭtagmeze; tm.: tagmeze; ptm.: posttagmeze; vesp.: vespere; gvid.: gvidant(in)o; kunv.: kunveno(j).

Germanujo

Esperanto-Verband Saargebiet und Westpfalz — En la lasta, nur malbone vizitita kunveno en Friedrichsthal oni preparolis multajn propagandajn demandojn. Oni decidis, en Majo aranĝi kunvenon kun parolado kaj ekspozicio en Völklingen, kie nia movado ekvivis dank' al la laboro de S-ro Moser.

Nordokcident-Germana E-Ligo — La ligo nun konsistas el jenaj grupoj: Bad Harzburg, E-grupo Brunsvigo, Nova E-Societo Braunschweig, Geestemünde, Göttingen, Hannover, Hildesheim, Oldenburg, Peine, Stade. La venonta ligo-kunveno okazos la 4. IV. en Bremen.

Sudokcidenta E-Ligo — La ligotago okazos en Junio en Hanau.

Virtemberga Esperanto-Ligo — Eksterordinara kunveno okazis en Geislingen, la 15. II. Ĉeestis reprezentantoj de la grupoj Biberach, Cannstatt, Esslingen, Heidenheim, Reutlingen, Stuttgart (Esperanto-Stelo kaj Laborista Grupo), same de la unuiĝo de esperantistaj instruistoj, krom tio partoprenis samideanoj el Geislingen, Göppingen kaj, kiel tre ŝatata gasto, Prof. Lang el Augsburga Grupo. La kunveno komenciĝis per komuna tagmanĝo en „Frühlingsgarten-Saal“, kie tuj poste okazis la intertraktado.

S-ro Hengstenberg el Esslingen, P de la ligo, prezidis, S-ro Leber el Stuttgart estis protokolanto. Ĉefa temo estis la liga gazeto, ĝis nun „Svaba Esperantisto“. Ĉar tiu gazeto ne estis elirinta dum la lasta kvarono de 1913, S-ro Hengstenberg klopodis aranĝi alie la aferon kaj emigis la firmon Dro Höhn el Ulm, eldoni ligan gazeton.

S-ro Hengstenberg klarigis la programon de la intencita duonmonate aperonta gazeto. Ĝi estu speco de familia gazeto kun monda kroniko pri ĝeneralaj (ekster esperantaj) aferoj tiel, ke la gazeto estu internacie disvastigebla.

La Stuttgartanoj, precipe S-roj Christaller kaj Vordermayer, ne ŝatantaj ĉiam novajn fondojn, pledis por plua oficialigo de „Svaba Esperantisto“, kiu denove aperis kaj montris emon al regula aperado. Ĉar evidente la plej multaj ĉeestantoj preferis la novan projekton, ĉar la ĝisnuna eldonanto ne kondukis kontentige, S-ro Christaller proponis, ke la nova gazetfirmo intertraktu kun la ĝisnuna pri transcedo de abonintoj,

kliŝoj kaj redakciaĵoj. Tiun proponon oni akceptis kaj decidis, ke „Svaba E-isto“ en sia nuna formo estu oficiala organo ĝis fino de Marto.

Oni plue demandis, ĉu ne estos eble, eldoni ŝir-kalendaron german-esperantlingvan. S-ro Bauer el Biberach, reprezentanto de la firmo D-ro Höhn, proponis, ke li instigu pri tio firmon, kiu sin okupas pri tiaj kalendaroj.

La ŝanĝo de la regularo laŭ la estonta aranĝo de la gazetabono — la ligo enhavos estonte ne plu grupo-membrojn, sed personajn — okazis rapide sen multa diskuto.

S-ro Hengstenberg raportis fine pri la de li komencita tradukservado. Li petis subtenon, kunlaboradon, pli ĝuste akcepton al tiu tasko de taŭga samideano. Prof. Christaller atentigis pri la simila tasko de la Literatura Asocio, al kiu S-ro Hengstenberg sin turnu kaj Prof. Lang el Augsburg, kiu ankaŭ por la gazetafero estis doninta konsiderindajn opiniojn, diris, ke li verŝajne interesos Augsburgan instruiston por tiu kunlaborado.

Antaŭ la 6a vespere finiĝis la oficiala kunveno, kaj baldaŭ poste la partoprenintoj disiĝis veturante al siaj hejmoj.

German-Studenta E-Asocio — Dum la duonjaro 1913/1914 la asocio malmulte, sed tamen iom pligrandiĝis; estas espereble, ke multaj el la greneroj semitaj dum tiu tempo ankoraŭ elkreskos. La asocio nun havas 3 ordinarajn membrojn (Halle, Leipzig, Stuttgart), 11 eksterordinarajn kaj 6 helpajn anojn. La asocio havos specialan fakkunvenon dum la Leipziga kongreso. — En Halle fondiĝis studenta fako en la tiea loka grupo. En Leipzig la studenta grupo kiel antaŭe kunvenas kune kun la akademia E-unuiĝo; en tiuj kunvenoj estas regule farataj referatoj pri sciencaj temoj. En Stuttgart la E-aj studentoj kunvenas ĉiudusemajne en la hejmo de la libera studantaro. — Je komenco de 1914 la asocio dissendis al multaj germanaj altlernejoj flavajn propagandafiŝojn. Estas dezirinde, ke en ĉiu altlernejo estu tia afiŝo, do ĉiu samideano — ankaŭ nestudenta — helpu al la asocio en tiu rilato.

Aachen — *E-Grupo*. La grupkunvenoj okazas regule ĉiumerkrede. En la monatoj Nov., Dec. kaj Jan. S-ro Hölscher faris po unu lumbildparolado pri siaj vojaĝoj al Svislando kaj Italujo, samtempe raportante pri la Berna kongreso. Li entute montris proks. 200 bildojn.

Aschaffenburg — *Loka Grupo*. En la jarkunveno, 14. I., la ĝisnuna estraro estis reelektata.

Auerbach i. V. — *Societo E.* La 13. II. la grupo havis sian fondiĝfeston en formo de biervespero, al kiu la partoprenantoj venis en diversnaciaj kostumoj. Prof. Nestler salutis la ĉeestantojn, kiuj bone amuziĝis ĉe diversaj prezentaĵoj kaj danco.

Bamberg — *Loka Grupo*. La firmo Schlenk afable disponigis al la grupo neuzatan butikon meze de la urbo, por en ĝi dum kelkaj monatoj elmontri E-aĵojn. Supera poŝtinspektoro Reber publikigis artikolon pri E en „Schweitzers Taschenkalender für bayerische Juristen“. E-gazetoj nun estas troveblaj en la stacidomaj restoracioj, hotelo National, Café Schönlein, en la „Altenburg“ kaj ĉe frizisto Wenning.

Berlin — *Katolika E-Societo*. Por 1914 la estraro konsistas el S-roj Fromm (P), J. Leszcynski (S), Schmelter (K) kaj Waldmann (B). Unuiĝa organo estas Germana Esperantisto. Kunvenoj ĉiulunde en stacidoma restoracio Alexanderplatz.

Beuthen — *Loka Grupo*. En la jara ĉefkunveno estis elektata la jena estraro: S-ro Grabosch (P), Dro Schmey (Vp), S-ro Schneider (S), S-ro Nusche (K).

Bochum — *Progreso*. Oficejo de la grupo nun estas ĉe la novelektita S, S-ro Benning, Bochum, Humboldtstr. 25.

Braunschweig — *Loka Grupo*. La grupo, kiu nun havas 50 anojn, festos, kiel unua grupo en Germanujo, la 8an de Marto sian 10an fondiĝfeston en „Parkhotel“ per festeno, prezentaĵoj kaj balo. *)

Bromberg — *Loka Grupo*. Ĉefkunveno okazis la 14. XII., kristnaska festo la 28. XII. En la urba biblioteko nun regule estas elmetataj G. E. kaj la Genova ekspozicia gazeto. E-ekspozicio okazis dum la 15a ĝis 22a II. en montra fenestro en Danziger Str.

Chemnitz — *Antaŭen ĝis la venko*. Antaŭ nelonge la grupo havis en la „Thalia“ sian 5an fondiĝfeston. La estraro ĝin bone aranĝis sub gvidado de la nova P, inĝeniero Grötsch. El la programo estas speciale citinda „internacia danco“, aranĝita de instruisto Flade kaj gvidita de E-feino, kaj la prezentado de duakta teatraĵo en E. Balo finis la feston, kiun ĉeestis multaj E-istoj kaj gastoj.

Danzig — *Loka Grupo*. Ĉefkunveno okazis la 5. II. La estraraj raportoj montris bonan staton de la grupo, speciale ankaŭ en financa rilato. Oni elektis la jenan estraron: S-roj Dro Seemann (P), Mathiak (Vp), Wiebe (S), Kallas (K). Por la gazeta propagando F-ino Schultz estis elektata kiel delegitino. Ĉiu membro, kiu pagis la tutan jarkotizon ĝis la 1. III., ricevas la eldonon A de G. E. — En la ĉefstacidoma halo kaj en la legoĉambro de la popola biblioteko estas elmetataj afiŝoj, atentigantaj pri E kaj la Danzigaj grupoj.

Dresden — *Societo E Dresden*. La jarfesto okazis en la tradicia granda stilo la 1. II. en la ĉambrego de „Vereinshaus,“ tute plenigita de samideanoj kaj gastoj. En salutparolado S-ro v. Frenckell (P) ĉefe atentigis pri la laboro farita en la pasinta jaro kaj farota en estonteco. Li finis per gratuloj al S-ino Hankel, kiu la 2an de Febr. povis festi sian 70an naskiĝtagon kaj pro tio estis nomata la unua „honora membro“ de la Societo. La programo enhavis kantojn de gevira horo sub gvidado de F-ino Lehner, solkantojn de S-ino Prof. Sahla kaj S-ino Dorothea Brehm, prezentadon de „La amfesteno en la kuirejo“ (aperinta ĉe Neumann & Co.) kaj „Esperanto-Revuon“, originale verkitan de Direktoro Kreidl. Ĉi tiu bela revuo gvidis la ĉeestantojn en la daŭro de unu horo tra ĉiuj partoj de Esperantujo. La proksimume 40 koncludantoj same kiel ĉiuj aliaj, kiuj ion prezentis dum la vespero, donis sian plej bonan. En paŭzo Prof. Dro Dietterle en la nomo de la Leipziga kongreskomitato invitis al vizito de la 9a germana kongreso je pentekosto. Donacloferio kaj balo kompletigis la sukcesplenan vesperon. — La monata kunveno en Febr. unuafoje okazis en la E-hejmo, kiu sin ankaŭ por tiu celo pruvis tute taŭga. En la kunveno oni ĉefe preparolis la taskojn

*) La ĉefa grupo en Berlin ja iom pli frue fondiĝis, sed ŝajnas, ke ĝi ne volas festi sian dekjaran ekzistadon. La redakcio.

por la venontaj monatoj. — La Orienta Grupo de la Societo en la hejmo aranĝis la 16. II. postfeston okaze de la 70a naskiĝtago de sia P S-ino Hankel. Komunaj kantoj, solkantoj de F-ino L. Oesterreich kaj festludo, speciale verkita de F-ino Zschepank kaj lerte prezentita de 4 grupaninoj, honoris la „naskiĝtaginfanon“ kaj gajigis la multajn ĉeestantojn. En la nomo de la grupo parolis S-ro Karsch pri la vivo de S-ino Hankel. Reprezentantoj de najbaraj grupoj transdonis siajn bondezirojn kune kun belaj flordonacoj.

— *Loka Ligo*. 2a ĉefkunveno okazis la 14. II. en la E-hejmo. Post raporto de S-ro Engst (P) kaj deŝarĝo de la estraro oni elektis la jenan estraron: S-ro Engst (P), S-ro Sykora (Vp), F-ino Wakeczynska (I. S), S-ro Nitzsche (II. S), F-ino Binne (I. K), S-ro Frenzel (II. K).

Eckernförde — *Loka Grupo*. Jara ĉefkunveno okazis la 13. XII. La estraro nun konsistas el S-ro Brunstamp (P), S-ro Lage (Vp), S-ro Schäfer (S), S-ro Andersen (K).

Geisslingen — La 15. II. okazis tie eksterordinara kunveno de Virtemberg'a E-Ligo (vidu la raporton sub ligoj).

Glauchau — *E-Societo*. Ĉefkunveno okazis la 13. II. Oni elektis kiel estraron: S-rojn Baumann (P), Nase (S), Stein (K).

Godesberg — *Godea*. La grupo havis sian ĉefkunvenon la 2an de Febr. Unue oni honoris la mortintajn anojn S-inon Donaisky kaj S-ron kolonelon Schroff. La ĝisnuna estraro estis reelektata. La lundaj kunvenoj de nun estos uzataj por komuna legado kaj preparolado de literaturo.

Greifswald — *Loka Grupo*. Festo pro la naskiĝtago de la germana imperiestro okazis la 24. I. en „Preußischer Hof“. Post salutparolado de rektoro Steinke festparolis en E poŝtinspektoro Rieck, kaj fine kantoro Gustavs donis raporton pri la vivo de la E-grupo kaj pri E ĝenerale.

Hamburg — *Loka Grupo*. En la ĉefa jarkunveno oni elektis la jenan estraron: Dro Cohen (P), S-ro Senff (Vp), S-roj Lauer kaj Schlegel (S), S-ro Glander (K). En diskutvespero S-ino Dro Jaffé parolis pri „jaluzo“; vigla diskuto sekvis la interesan paroladon.

— *Grupo Progreso*. La raportoj faritaj en la jarkunveno donis kontentigan bildon pri la stato de la grupo. — Bedaŭrinde la grupo perdis per morto sian fervoran membron Franz Trutzel.

— *Verda Stelo*. En la ĝenerala kunveno, la 20. I., estis elektataj S-ro Senff (P), S-ro Ovens (Vp), S-ro Witt (S), S-ro Peters (K), S-ro Probst (B).

— *Poŝtista Unuiĝo*. Laŭ decido de la jarkunveno nun estas P: S-ro Frank, Vp: S-ro Lauer, S: S-ro Kofmann, K: S-ro Suhse.

— *E-Klubo de 1912*. En la ĝenerala kunveno, la 5. I., S-ro Hoffmeister raportis pri la pasinta agadjaro, dum kiu la nombro de la membroj preskaŭ triobliĝis. S-ro Hoffmeister estis reelektata kiel P, Vp oni elektis S-ron Krüger, S: S-ron Wiechern, K: F-inon Henneke. Ĉe la fino de la kunveno okazis kunsido de la U. E. A.-anoj, en kiu S-ro Hoffmeister estis reelektata kiel D de U. E. A.; tuj 60 personoj novaliĝis al U. E. A. por 1914.

— *Laborista Grupo*. En ĉefkunveno, la 15. I., la ĝisnuna estraro estis reelektata. Por propaganda celo oni kolektis en la kunveno pli ol 76 M.

Hanau a. M. — *Loka Grupo*. La 10. III. la grupo aranĝos en Gasthaus zur Krone publikan paroladon pri „Esperanto kaj la katolikoj“. Paroladantoj: lia kaplana moŝto Weidner el Hanau kaj S-ro Rob. Kreuz el Frankfurt a. M. — La prezidanto invitas la najbarajn gesamideanojn kaj petas, respondi al la cirkulero de S. O. L.

Hannover — *Loka Grupo*. La 24. I. okazis la jara ĉefkunveno. Kiel P estis reelektata S-ro Roever. Kunvenoj ĉiumerkrede vesp. en Wachsnings hotelo, Schillerstr.

Hildesheim — En la oficejo de la Porfremdula Societo en „Knochenhaueramtshaus“ (apud la ĉefplaco) ekzistas libro destinita por enskribo de travojaĝantaj E-istoj. Oni petas ĉiujn samideanojn, kiuj vizitas la urbon, ne forgesi iri al la oficejo kaj enskribi sin en la libron.

Ingolstadt — Per gazetnotoj S-ro Strößner el München komencis ankaŭ en I. propagandon por E.

Königshütte O.-Schl. — *Loka Grupo*. La 11. I. la grupo glitveturile ekskursis al Tarnowitz, la 27. I. La s-roj de la grupo festis la naskiĝtagon de la imperiestro per festeno, kiun S-ro Bluschke lerte gvidis, kaj la 15. II. okazis en „Parkhotel“ karnavala festo kun koncerto, teatra prezentaĵo kaj dancado.

Lauban — *E-Societo*. Ĉefkunveno okazis la 4. II. Oni elektis P: S-ron A. Lachmann, S: S-ron Krause, K: S-ron E. Lachmann.

Leipzig — *Societo Leibniz*. En la jara ĉefkunveno, la 26. I., estis elektataj S-ro Petzold (P), S-ro Baumgärtel (S), S-ro Emmrich (K).

— *E-Unuiĝo de Magistratoficistoj*. Ĉefkunveno okazis en Januaro. Laŭ la raportoj de la estraro la grupo estas en bona stato kaj ĝojige evoluis dum la unuo jaro de sia ekzistado. La ĝisnuna estraro estis reelektata. Post la oficiala parto instruisto Rössel faris E-paroladon pri Bulgarujo.

Lübeck — *Societo E.* En diskutvespero, la 14. I., S-ro Selmer, P de la komercista grupo, parolis pri „la fero“. La ĉefa jarkunveno okazis la 29. I. En ĝi la estraro donis kontentigajn raportojn pri la pasinta jaro, kaj oni priparolis la laborprogramon por 1914. La ĝisnuna estraro estis plene reelektata.

Mülhausen (Els.) — *Loka Grupo*. Ĉefkunveno okazis la 6. I. Oni elektis la jenan estraron: S-ro Denninger (P), S-ro A. Jaquel (Vp), S-ro Hecky (K), S-ro Muré (S), S-ino Feuerbach (2. S), F-ino Jaquel (B). Oni decidis, por ĉiu membro aboni ambaŭ eldonojn de G. E.

Offenbach (Main) — *Loka Grupo*. La 15. I. okazis ĝenerala kunveno bone vizitata. Oni elektis: P: S-ron Mauer, S: S-ron Burkhard, K: S-ron Weipert. Kunvenejo estas Erbacher Hof, Schlossstr. 10.

Rheine (Westf.) — *E-Klubo*. La 11. I. la grupo festis sian duan fondiĝfeston en ĉeesto de ĉirkaŭ 60 personoj. S-ro Albrecht (P) festparolis, diversaj prezentaĵoj amuzis la grupanojn kaj gastojn, kiuj ĉe dancado kune restis ĝis malfrua horo.

St. Ingbert (Pfalz) — *Loka Grupo*. La ĉefkunveno okazis la 8. I. La ĝisnuna estraro estis reelektata, la forloĝiĝintan S-ron Kirsch (nun en Mannheim) anstataŭas S-ro Pflug. — La grupo lasttempe perdis du fervorajn anojn: mortis S-roj Weiss (post longa malsano) kaj S-ro Rickel (per akcidento). Ĉe

la enterigoj reprezentantoj de la grupo metis florkronojn sur la tombojn, samtempe esprimante en E-paroladetoj la funebnon de la grupo.

Schleswig — *E-Klubo*. En la ĉefkunveno la ĝisnuna estraro estis reelektata, kaj la grupo ricevis la nomon „*Per propria forto*“. La agadan kunsidon sekvis amuza parto, kiu kune tenis la anojn kun la gastoj ĝis malfrua horo.

Schweidnitz — *Loka Grupo*. La 29. I. la grupo havis sian ĉefkunvenon. La jarraportoj de la estraro montris ĝojigan staton de la grupo. La ĝisnuna P, kalkulkonsilanto Schulz, pro malsaniĝo kaj transloĝiĝo al Ueberlingen apud la Lago de Konstanz devis fordoni sian oficon. Pro liaj meritoj je la grupo oni nomis lin „honora membro“. Nova P nun estas Prof. Dro Huebner, Vp fariĝis S-ro Krause, K: S-ro Zuckschwert, S: S-ro Stabler, B: F-ino Huebner.

Spandau — *Loka Grupo*. La grupo ricevis la 15. II. la viziton de kelkaj Berlinaj kaj Charlottenburgaj E-grupoj post ties ekskurso al Grunewald. En la grupoj la partoprenantoj ĉe diversaj prezentaĵoj kaj dancado travivis agrablan vesperon.

Stuttgart — *La Patronaro de la Virtemberg'a E-Instituto* havis la 8. II. sian jarkunvenon. Post raportoj pri la evoluo de la instituto dum la unua jaro de ĝia ekzistado — la nombro de la patronoj dum tiu tempo preskaŭ triobliĝis — S-ro Hengstenberg detale parolis pri E en la servo al komerco kaj industrio, pri la novaranĝita traduka servo, la pasinta germana E-kongreso en Stuttgart kaj eble okazonta internacia kongreso ktp. La kasista raporto bedaŭrinde montris deficiton, kiun kelkaj ĉeestantoj per mondonacoj forigis. Kiel P de la patronaro estis reelektata S-ro Pilz.

— *Esperanto-Stelo*. Familia vespero kun riĉa programo, konsistanta el kantoj, deklamoj, muzikaĵoj kaj ŝercaj prezentaĵoj, okazis la 25. I. Ĉeestis multaj samideanoj kaj gastoj el Stuttgart kaj la najbaraj urboj kaj lokoj. Krom salutparolado de Prof. Christaller la ĉeestantoj aŭdis tre instruan paroladon de S-ro W. Christaller jun. pri „La Ponto“.

Waltersdorf (Amtsh. Zittau) — *Loka Grupo*. Ĉefkunveno okazis la 24. I. Post kontentigaj raportoj de la estraro oni reelektis la estraron ĝisnunan. Libro-premioj estis donacataj al la senlacia kursgvidantoj S-roj Würfel kaj Scholze. Kelkaj grupanoj decidis viziti la tutaŭstrian kongreson en Franzensbad, kaj ili tre bedaŭras, ke la kongresoj en Leipzig kaj Franzensbad koincidas. (Ĉu germanoj ne devas viziti unuavice sian nacian kongreson? Fiksante la tempon de niaj naciaj kongresoj la estraro de G. E. A. ne povas konsideri la kongresojn en aliaj landoj. *La red.*)

Zittau — *Societo E.* La estraro konsistas nun el S-roj Hösel (P), Entel (S) kaj Urban (K). Publika amuza vespero estis aranĝita la 21. II.

•
Propagandaj paroladoj — *Berlin*: Merkur, 26. II. — *Esslingen (Württ.)*: S-ro Hengstenberg, 28. I., kun ekspozicio — *Eutin*: Loka Grupo, S-ino Dro Jaffé kaj S-ro Senff el Hamburg — *Gleiwitz*: Loka Grupo, 5. II., kun provleciono — *Göppingen (Württ.)*: 3. II., Prof. Christaller, laŭ instigo de la Komercista Unuiĝo — *Halle a. S.*: Loka Grupo, 17. I., S-ro Schmiedeberg el Delitzsch — *Hamburg*: Vortrupp-Gruppe, 8. I.,

S-ro Hoffmeister; Laborista Grupo, S-ro Reisen — *Hannover*: Loka Grupo, 7. II., Prof. Dro Ledermann el Augsburg, por propagandi en rondoj de supera instruistoj — *Heslach apud Stuttgart*: Kristana Unuiĝo de Junaj Viroj, Prof. Christaller — *Kiel*: Vortrupp-Gruppe, S-ro Tarnow — *Lobstädt apud Borna*: en Februaro, la sekretario de Saksa Esperanto-Instituto, S-ro Hahn — *Metz*: Amika Rondo, en Februaro, S-ro G. Schiele — *Mogilno*: 25. I., S-ro Jagielski — *Naunhof-Brandis*: en distrikta asocio de geinstruistoj, S-ro Hahn — *Neukölln*: Stenografia Unuiĝo „Gabelsberger“, 5. II., S-ro Ellersiek.

